

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Kongres-loko fiksita por la 104-a Japana Kongreso en 2017

En la antaŭa n-ro, ni informis, ke ni invitis la venontjaran Japanan Esperanto-Kongreson en nia urbo Jokohamo, sed ke kongresejo estis serĉata. Jen ni fiksas ĝin: *Kanagawa Roodoo Plaza* (Placo por Laboroficoj de la Gubernio Kanagavo), kun haloj kaj ĉambroj por diversaj kunsidoj. Ĝi situas je 3-minuta piedira distanco de Stacidomo Iŝikaŭaĉoo (Ishikawacho) en Jokohamo, kaj 10-minuta piedira distanco al la monde fama Ĉina Kvartalo en Jokohamo.

La kongreso mem estas de la 3a ĝis la 5a de novembro 2017, kaj ni ankaŭ havos ekspozicion de “Nia Unua Lernolibro” okazinta ĉi-jare, en ekspoziciejo de la domo en la teretaĝo.

En Oumihaĉiman ĉi-oktobre, ni aktivis en la 103-a Japana Kongreso

1. **Ĝenerale:** De la 8-a ĝis la 10-a de oktobro 2016, en Urbo Oumihaĉiman (pli ol 400 km okcidente de Jokohamo) okazis la 103-a Japana Esperanto-Kongreso. En la Ferma Ceremonio, en la 10-a, ni Jokohama-anoj iris sur la podion por apelacii pri la venontjara kongreso ĉe ni, transricevis la kongresan standardon de la Loka Kongresa Komitato de la 103-a Kongreso, kaj Namba Fumiharu, unu el niaj estraranoj faris invitoparolon (enhavon en la venonta paĝo!).



Dum la kongreso ni akceptis aliĝon al la venonta kongreso ĉe ni, kaj 54 personoj aliĝis.

2. **Premioj:** En la Ferma Ceremonio, du Jokohama-anoj estis premiitaj.

(1) Premio Ossaka (memore al Ossaka Kenĵi, patro de la japana movado): Sibayama Zyun'iti estis honorita kiel unu el la 3 membroj de la grupo NUN-vortoj. La grupo publikigis japana-esperantan terminaron pri modernaj aferoj kaj esperantigis la Japanan Konstitucion. En la 9-a tago, li faris prelegon kaj klarigis, kio estas la laboroj de NUN-vortoj.

(2) Literatura Premio: Aida Kiyoshi ricevis la 2-an premion pro la tradukaĵo “Rakontis steloj iunokte”, fabelo de Ogawa Mimei.

3. **Fakkunsidoj:** Jokohama-anoj gvidis kelkajn el la fakkunsidoj.

(1) Delegitoj de UEA: Tiun fakkunsidon gvidis Doi Hirokaz, la ĉefdelegito japana.

(2) Kantado: En tiu fakkunsido, Makino Micuo gvidis kantojn, i.a. “Rekviemo” por la cunamo-damaĝitoj en marto 2011. Okaze de la Amika Vespero, la kanto estis prezentita.

Salutvortoj por la JEK en Ŝiga

NAMBA Fumiharusi

Saluton! Mi estas NAMBA Fumiharu, unu el la komitatanoj en loka Esperanto-Grupo de Jokohamo "NPO Esperanto Jokohama".

Nun mi prezentu pri la venontjara kongresa urbo Jokohamo.

Pro tio, ke ĉifoja kongreso okazas apud la lago Biŭa, kaj ĉifoja kongresa temo rilatas al akvo kaj naturo, mi volas prezenti akvo-rilatan epizodon en Jokohamo.

Por ŝipistoj, akvo de Jokohamo estis fame konata jam longe. Onidire, akvo ŝarĝita sur ŝipon en la haveno Jokohamo ne malboniĝas nek putras dum longa vojaĝo, eĉ ĝis kiam la ŝipo transiras la ekvatoron! Ŝipistoj tiel aplaudis la akvon de Jokohamo.

Por protekti tiel bonegan akvon, antaŭ ĉirkaŭ cent jaroj Jokohamo ekposedis vastan arbaron en la monta vilaĝo Doŝi, kiu situas kvindek kilometrojn okcidente de Jokohamo. Kaj la buroo de akvoprovizado konservas la arbaron jam longe.

Pro tio, inter Jokohamo kaj la vilaĝo Doŝi estas tre profunda interrilato kaj amikeco. Ekzemple, multaj geknaboj en Jokohamo vizitas la vilaĝon Doŝi por somera tendaro kaj ekskurso. Krome geknaboj en Doŝi ankaŭ vizitas

Jokohamon kaj havas interkomunikadon kun la geknaboj en Jokohamo.

Jen estas botela akvo de vilaĝo Doŝi. (Mi kaj kelkaj rondanoj montras la botelojn)

La botelo estas aĉetebla en la buroo de akvoprovizado de Jokohamo. Ĝi estas tiel nomata "Oficiala Akvo de Jokohamo".

Mi jam kelkfoje trinkis ĉi tiun akvon, kaj mi sentas ke la gusto estas tute kutima en Jokohamo, la gusto de Jokohama-akvo!

Kiam vi venos kaj partoprenos la venontan kongreson en Jokohamo, bonvolu trinki akvon en Jokohamo. Ĝi estas ne nur aplaudita de ŝipistoj, sed ankaŭ la simbolo de longatempa amikeco inter Jokohamo kaj la monta vilaĝo Doŝi en profunda kaj konservita naturo!

Fine, Bonvenon al nia havenurbo Jokohamo! Dankon.

(Poste)

Ni donacas la botelojn al tiuj, kiuj volas trinki, Bonvolu!



Niaj Planoj

Por la venonta Japana Kongreso

(Hama-Ronda Vespero novembra)
Nov. 19 (sab), 17h00-19h00, ĉambro 604 de Kanagawa-Kenmin-Sentaa

Ni diskutu, kia estos, kia estu la 104-a Japana Esperanto-Kongreso, okazonta unu jaron poste en Jokohamo.

46-a Zamenhof-Festo de Kanagaŭa

Dec. 18 (dim), 13h00-16h00, en la konstruaĵo UMECO en urbo Odawara
Gastprelegos s-ro Huzimaki Ken'iti.



Tiel Okazis

Internacia Festo de Jokohamo

En la 8-a kaj la 9-a de oktobro (do, paralele al la 103-a Japana Kongreso), en Jokohama estis la "Internacia Festo de Jokohamo", kaj ankaŭ nia grupo faris ekspozicion pri Esperanto tie. Malgraŭ pluvo en ambaŭtagaj antaŭtagmezoj, ni propagandis Esperanton, farante tendon. Ĉi-jara Festo okazis en la Parko "Gran-Moru / Granda Mall" de la distrikto Minato-Mirai.

La aŭtuna kurso komenciĝis!

De la 22a de oktobro ĝis januaro, estas la rudimenta kurso de Esperanto, en nia kutima kunsidejo. Unu lernanto venis, kaj Fuse Kentarou gvidas.

Eseoj

Lago Biŭa; “Antikva lago”, “Lago de greboj”

TANIGAWA Hirosi

La 103-a Japana Esperanto-Kongreso okazis 8~10/okt., ĉe Vories-Gakuen (La Lernejo de Vories), Urbo Oumihaĉiman, Gubernio Ŝiga.

Partopreninte en ĝi min tre impresis, ke Vories-Gakuen ne estis nura prunedonanto de la kongresejo, sed estis aktiva gastiganto. Diversfaze ni sentis tion; ĉirkaŭ ĝia ĉefenirejo flirtis kvin bonvenigaj flagoj kun la nomo de “Vories-Gakuen” subskribite, kaj la altlernejoj ĝojigis kaj kortuŝis nin per bonvenigaj prezentaĵoj de blovensemblo kaj de koruso. Je la soleno la estro de Gakuen salutis tre varme, kuraĝige al ni. Kun dankegoj ni tion memoru.

Lago Biŭa, la temo de la Kongreso

Inter la kongresprogrameroj estis publika prelego temanta pri Lago Biŭa de YAMAGUĈI Takao, la aŭtoro de la verkaĵo “De Dinamika Lago Biŭa al la mondo” (eldonita origine japanlingve, kaj esperantotraduko estis publikigita memore al la 103-a JEK)

La preleganto klarigis, ke Lago Biŭa estas unu el la monde raraj (tutmonde nur ĉirkaŭ dudek) konfirmitaj kiel “antikvaj lagoj”. Laŭ li, ordinaraj lagoj malaperas de kelkmil ĝis kelkdek mil jaroj pro sedimentado de tero kaj sablo, dum “antikvaj lagoj” kiuj formiĝis per terkrusta movado vivas kelkmilionojn da jaroj. Lago Biŭa naskiĝis antaŭ 4 milionoj da jaroj en la regiono 40 kilometrojn sude de nuna pozicio, kaj iom post iom transiĝis norden kaj lokiĝis ĉe nuna loko antaŭ ĉirkaŭ 400 mil jaroj. Jam la terkrusta movado ĉesis ĉe la plej suda parto de la Lago. Kaj tie ĝi malprofundiĝas 1 mm jare. Sed ĝia grandparto sinkas meznombro 1 mm jare. Lago Biŭa ankoraŭ dinamike vivas, montrante la gravecon de la akvo, al kiu la tuta homa mondo ŝuldas la daŭripovan vivon; argumentis la preleganto.

En la Edo-epoko la nuna Gubernio Ŝiga nomiĝis “Provinco Oumi”, kaj Lago Biŭa alinomiĝis “Lago de greboj”. Tiutempe ĉirkaŭ la mezorienta parto de la Lago (nuna Oumihaĉiman) troviĝis multaj marĉoj, ĉe kies bordoj dense kreskis kanoj. Greboj kutimantaj havi frosantan neston inter kanoj en la marĉo vivadis

amase. En moderna epoko la marĉoj ĉirkaŭ Oumihaĉiman pli kaj pli malmultiĝis pro la vasta polderigo. Greboj malmultiĝis.

Hajkoj de Baŝoo

Lago Biŭa kun sia vastega, belega pejzaĝo ĉiam allogadis homojn. Edo-epoka hajkisto Baŝoo (1644~1694) estis unu el la Lago-de-greboj-amegantoj. Li ofte vizitis kaj restis en siaj vesperaj jaroj en Templo Giĉuuĵi tiutempe situanta ĉe la suda bordo de la Lago. Li ĝuis hajko-kunvenojn kun oumi-provincaj hajkisto-amikoj, ŝatis ekskurseti en barketo en la marĉoj.

Baŝoo versis;

五月雨に鳩(にお)の浮き巣を見にゆかむ

Printempe pluvas — flosantan neston greban,
mi gvatu kaŝe.

ゆく春を近江の人と惜しみける

Printemp' foriros, kun Oumi-amikoj tion
domaĝas.

Baŝoo testamentis, ke post lia morto oni entombigu lin en Templo Giĉuuĵi, kie li ofte restadis. Kiam li mortis en Osako, liaj disĉiploj portis lian korpon ĝis Giĉuuĵi kaj funebre entombigis lin tie.

(noto) Ĉi-supraj du esperanto-tradukoj de Baŝoo-hajkoj estas de S-ro Sibayama Zyun'iti.

(fino)



La furorulo de la parko

AKIYA Hideo



Ne malmultaj parkoj troviĝas en la proksimo de mia loĝejo. Unu el la plej grandaj estas la Gubernia Parko de Kvar-sezona Arbaro, “Kenritu Ŝiki-no-mori Kooen.” Montetoj kaj valetoj kovritaj de diversaj arboj faras ondantan terenon, kaj ĝi ĉirkaŭas oblongan lageton. Vastega spaco de la parko pleniĝas de naturo. Kaj la pejzaĝo de “*sato-yama* (apudvilaĝa monteto)” estas bone konservita. Promenejoj kondukas tra la parko kaj oni povas ĝui la pejzaĝon de diversaj lokoj. Por rondiri tra la parko, iom pli ol unu horo necesas al mi inkluzive de iro-reiro. Tio taŭgas por mia taglabora paŝado por sano. Tial mi ofte vizitas la parkon.

Diversaj vizitantoj aperas tie. Promenantoj piediras silente, kaj trotadantoj kuras iomete vigle. Infanoj gvidataj de vartistinoj, kaj grupoj de lernejoj ĉiam gajigas atmosferon. Hundamantoj uzas la parkon por siaj promenadoj kun hundoj. Kelkaj familioj puŝas bebĉaron, kaj kelkaj aliaj familioj ĝuas piknikon sur gazono. Geedzoj maljunaj paŝas malrapide aprecante florojn kaj arbojn. Ĉi ĉion oni vidas ĉiutage. Ankaŭ en libera tago pentristoj troviĝas de loko al loko.

La plej rimarkindaj el ĉiuj vizitantoj estas grupo da fotistoj, kiuj kolektiĝas ĉe unu loko apud la lageto. Kvin, ses, fojfoje pli ol dek fotistoj restas tie. Ne profesiuloj, mi supozas, ĉiuj estas, sed iliaj iloj aspektas ja profesiaj. Multe da fortikaj tripiedoj vice staras laŭ la bordo de la lageto. Ĉiu tripiedo portas grandan fotilon kun longa teleobjektivo. Unu velkinta, maldika arbo elstaras ĉirkaŭ unu metron supren

de akvosurfaco ĉirkaŭ dek metrojn antaŭa. Ĉiuj fotiloj rigardas la pinton de la arbo.

Ŝajnas, ke fotistoj babilas inter konatoj atendante fotindan momenton, sed ili neniam parolas laŭtvoĉe. Kredeble ili retenas sin tiel, ĉar se estus malkviete, la atendato certe ne alproksimiĝus al ili. La atendato estas unu sovaĝbirdo, alciono. Kelkfoje mi vidis la birdon ĉi tie. Ĝi havas tiel same malgrandan korpon, kiel pasero, sed havas pli grandajn kapon kaj bekon, kiuj ŝajnigas sin iomete forta. Kaj ĝia plej mirinda beleco estas la brilanta bluo kiu kovras ĝian tutan dorson.

La alciono de tempo al tempo alflugis kaj sidis ĉe la pinto de la velkinta arbo. Ĝi turnis sian kapon dekstren kaj maldekstren, kaj enrigardis sub la akvon. En unu momento, la alciono plonĝis rekte en akvon, tuj poste elflugis, kaj revenis al la arbo. Ne ĉiufoje ĝi sukcesis, sed ofte ĝi revenis kun iom nigreta ĉasaĵo en sia beko. Tiam ĝi ankoraŭfoje turnis sian kapon kvazaŭ ĝi montrus la ĉasaĵon al la spektantoj, kaj tuj forflugis ien. Ĉi tiu rapida ĉasado estas ja celo de la fotistoj. Ĝuste en la momento obturiloj simultane eksonis kaj detruis kvieton. Post kiam la birdeto forflugis, la lageto retransviliĝis.



Oni diras, ke en la parko vivas multe da variaj sovaĝbirdoj. Sed, neniu alia estas pli furora ol ĉi tiu alciono, ĉar nur ĝi prezentas sian ĉasadon antaŭ publiko. Neordinara nombro da homoj enfokusigas siajn okulojn al unu birdeto, sed ĝi ne timas pro tio. Eĉ se ĝi rimarkis la homojn, ĝi povis plenumi la laboron sen hezito. Do la alciono eble estas talenta aktoro. Aŭ, ĉi tiu malgranda birdo estus vere la granda stelulo, ĉar ĝi lasas spektantojn atendi tre longe por sia momenta aktorado. Amaso da fotistoj daŭre kunvenas tien por atendi la stelulon, matene kaj tage, hieraŭ, hodiaŭ, kaj certe ankaŭ morgaŭ.